Kvaronjara **Bulteno** de la — Quarterly **Bulletin** of the

# Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
# American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) (Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 179 ISSN: 0002-7499 januaro 2009

## Enhavo

AATE Matters
Jarkomenca mesaĝo de nia prezidanto .......... 1
Ĉu vi jam pagis vian AAIE-kotizon .......... 1
Esperanto-klasoj en Usono kaj Kanado .......... 2
ILEI matters .......... 2
Instruado ĉe Inter-reto .......... 3
From and about our members .......... 3
Per-koresponda kursaro de E-USA .......... 4
Recommended reading and listening .......... 4
Kalendaro .......... 5
Esperanto-instruado alilande .......... 5
Teaching suggestions .......... 6
Announcements .......... 6
Course Report Form .......... 7
Membership Form .......... 8

*Redaktoro*
Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA
<dorothyjeanh@gmail.com>

*Vic-Prezidando / Bultena Formatisto / Retejestro*
D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

*Prezidanto*
Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

*Eduka Sekretario*
Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>

*Koresponda Sekretario*
Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

*Kasisto*
Mary Napolitan <mjpn@comcast.net>

http://aaie.us

AATE Matters

## Jarkomenca mesaĝo de nia prezidanto

Mi opinias ke ĉiuj el ni scias ke ne estas facila afero trovi lernantojn al kiuj ni povas instrui Esperanton. Tamen ni devas esti persistemaj kaj pensi pri ĉiu ebleco. Kelkfoje oni povas finfine sukcesi.

Mi mem havas iom da sukceso. Dum la venonatj monatoj mi havos ŝancon instrui Esperanton en kvar malsamaj kadroj!

(1) Mi povos daŭrigi instrui la junul-klason dimanĉe ĉe mia preĝejo kiel parto de instruado pri mond-civitaneco.

(2) Mi denove havos ŝancon instrui Esperanton unufojon semajne en duagrada lernejo kiel parto de klaso pri kiel efektivigi pli pacan mondon.

(3) Mi havos ŝancon instrui Esperanton al lernantoj en baza lernejo du fojojn semajne post la normalaj horoj.

(4) Mi havos ŝancon instrui kurson en universitato kiel parto de la ekster-terena programo por edukado por nekutimaj studentoj.

Mi bone komprenas ke mia situacio estas iom eksterordinara kaj ke aliuloj probable ne havos la samajn ŝancojn, kiujn mi havas. Tamen se oni vere serĉas eblecojn kaj pensas pri nekutimaj situacioj, kelkfoje oni povos trovi ion. Ekzemple, ĉu estas skoltoj kiuj volas lerni fremdan lingvon kiu ne estas tro malfacila? Ĉu estas ŝanco instrui klason ĉe publika aŭ eĉ lerneja biblioteko je sabatoj aŭ dum la vesperoj? Se vi ofte parolas pri Esperanto kaj la spertoj kiujn vi havis rezulte de Esperanto, eble kelkaj homoj volas ekscii pli pri ĝi.

Do ne ĉesu peni trovi lokon por instrui Esperanton. Kaj **ne forgesu membriĝi nun en AAIE por la jaro 2009.**

Bondezirojn al ĉiuj por la venonta jaro,
Ronald Glossop, Prezidanto, AAIE

## Ĉu vi jam pagis vian AAIE-kotizon por la jaro 2009?

Laŭ la arkivoj de via redaktoro, la jenaj povas respondi "Jes!": Danhof, DuTemple, Kolker, Napolitan, Wells (Kompreneble dumvivaj membroj ne devas pagi, sed iliaj monaj donacoj estas ĉiam bonvenaj). Sendu la formularon sur paĝo 8 kun via pago. Antaŭdankon!

### Bonvenon al la jenaj novaj membroj!

- Boris Kolker, kiu en 1993 enmigris Usonon el Rusio, kie li jam verkis la lernolibron Vojaĝo en Esperanto-lando, kiun oni uzis samjare ĉe la Esperanto-somera kursaro NASK, kaj kiu estas la bazo de Niveloj 3 kaj 4 de la E-USA Esperanto-kurso (vidu paĝon 4). Li nun loĝas en Cleveland Heights, Ohio.
- Sherry Wells, (Royal Oaks MI), kiu estis AAIE-ano inter 1988 kaj 1993. Ŝi diplomiĝis kun BA en edukado, sed neniam plentempe oficiale estis instruisto. Tamen, ŝi ofte instruas Esperanton kaj la juron. Krome inter 1998 kaj 1991 ŝi prelegis pri E-o pli ol 100 fojojn, kaj havas denaskan Esperantistan filinon.

### AAIE nun havas novan Edukan Sekretarion!

Sherry (Ŝeri) Wells ĵus konsentis esti nia Eduka Sekretario dum du-jara periodo (2008-2010), por anstataŭi Elizabeto Magallon Dorcas, kiu fidele servis en tiu posteno ek de julio 2006. Bonvolu sendi al Ŝeri raporton pri via Esperanto-klaso (uzu la formularon sur paĝo 7).

### Ĉu vi jam cerbumis pri nova nomo por AAIE?

En la septembra Bulteno nia prezidanto sugestis ke eble estus bona ideo ŝanĝi la nomon "Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto", ĉar vere ne temas pri "Ameriko", en la Esperanto-senso. Do, jen peto:

With your membership renewal payment please send your answers to the following questions:

1. Do you think AATE/AAIE should change its name?
2. If yes, which of the following would you prefer?
   a) Esperanto-Instruistoj en Usono kaj Kanado (IE-UK)
   b) Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Usono kaj Kanado (ILEI-UK)
   c) Other ___________________________

You'll find the questions at the bottom of the membership form on the last page.

If you are a life-time member, or have already renewed your membership for 2009, so won't be submitting a membership payment, please send your answers to our president (Ron Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings MO 63136-5004; or <rglossop@mindspringcom>) or to the editor (Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521; or <dorothyjeanh@gmail.com>). ANTAŬDANKON!

## Esperanto-klasoj en Usono kaj Kanado

This year's 3-week summer Esperanto courses (NASK) will be held at the University of California in San Diego from June 29 to July 17. Here are more details from Ellen Eddy:

**North American Summer Esperanto Institute (NASK)**
University of California, San Diego
June 29 – July 17, 2009
Three levels Three weeks Five college credits

Instructors
Spomenka Ŝtimec (Croatia)
Paul Gubbins (UK)
Lee Miller (USA)

Course fees: $1400 (estimated) may be waived for full-time students and teachers
Housing: Single bedrooms, three meals a day: $1360
Scholarships available

- Be a part of Esperanto history as we celebrate our 40th year of NASK.
- Meet with former instructors in person or by live video hookup.
- Share your pictures and stories about your experiences at NASK.
- Join the special party plans as a student or a visitor.
- If you can't come, consider sponsoring a student.
- Follow the planning at http://Esperanto.org/nask/

*For more information*
eddyellen@aol.com
http://Esperanto.org/nask/

### Have YOU taught Esperanto recently?

If so, we want to hear from you! Every class, no matter how small, is important. Use the form on page ___, and send it to our new Education Secretary, Sherry Wells.

## ILEI matters

### IPR

Post la septembra *AAIE-Bulteno*, alvenis du eldonoj (08/3 kaj 08/4) de la *Internacia Pedagogia Revuo*, la oficiala organo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ĉar ĉiu AAIE-membro estas aŭtomate membro de ILEI, vi rajtas ricevi tiujn revuojn. (Se 08/3 kaj/aŭ 08/4 ne atingis vin, bonvolu informi la redaktorinon, Doroteo Holland). Jen kelkaj interesaj artikoloj en 08/3 (legu mem la detalojn!):

- Raporto de la 41-a ILEI-konferenco en Portonovo, Benino, pasintan someron, kun partopreno de 65 e-istoj (23 el Afriko kaj 42 el Azio kaj Eŭropo). Ĝi estis la unua internacia E-aranĝo en Afriko!
- Tago de la Lernejo 2008 dum la UK en Roterdamo; temo: "La pedagogia valoro de Esperanto".
- Kiel starigi kaj organizi Lingvan Festivalon en via urbo

- 105 Esperantistoj el 25 landoj partoprenis ok-tagan renkontiĝon de partoprenintoj en Somera E-Studado kaj lernu! en Slovakio pasintan aŭguston.
- En IPR 08/4 troviĝas ok paĝoj pri la ILEI-Konferenco en Krakovo, Pollando, 17-25 julio, 2009, (tuj antaŭ la UK en Bjalistoko), inkluzive aliĝilon. Similaj informoj troviĝas en la hejmpaĝo de ILEI: <www.ilei.info> La ILEI-konferenca temo estas La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado omaĝe al sia 60-jaraĝo, al la 60-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj al la Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009.

## Decidoj de la ILEI-estraro

Dum kunveno de la ILEI-estraro en Krakovo, Pollando, pasintan oktobron, oni faris la jenajn decidojn:

a) Akcepto de Kubo kiel lando kie okazos la ILEI-Konferenco en la jaro 2010;
b) Planas trejnseminarion en Kinshasa , Afriko, en la jaro 2009;
c) Ebleco akordigi kaj komplementigi la temojn de la ILEI-Konferenco kaj de la Universala Kongreso ek de 2009;
ĉ) Planis pluan okazigon de seminarioj de "Flugiloj de Malfacila Vento" kadre de TEJO-aranĝoj;
d) Aprobis la lanĉon de oferto de la ILEI-Libroservo.

# Instruado ĉe la Inter-reto

One of the quickest, easiest, and least expensive ways to learn Esperanto is to enroll in one of the numerous free courses at the website **Lernu.net**, which range from brief introductions to intermediate and relatively advanced. With some courses a volunteer tutor is available to answer questions. Supplementary materials include an on-line magazine for children named *Babili Esperante*, exercises, exams, lists of useful phrases, grammatical summaries, games, and downloads. There are even "virtual classrooms" that allow students to study together, guided by a volunteer teacher, and an instant messaging system that allows students in different places to converse with each other, putting what they've learned to immediate use.

If you have employed any of this material in your teaching (or taken one of the course for your own interest), please send our *Bulteno* editor an account of your experience. What did you think of the various courses and supplementary materials? Did you encounter any new, particularly useful techniques for teaching Esperanto? We'd like to hear your views.

There is a separate website at **Edukado.net** with its own set of instructional materials and advice and up-to-date news. Again, please send us your opinions and suggestions on making use of the materials there.

Finally, AATE itself has a website at http://aaie.us. We'd like your suggestions for expanding and improving the contents. Contact our web-master, Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>.

# From and about our members

Ni sendas niajn elkorajn kondolencojn al **Duncan Charters** (Elsah IL) pro la forpaso en decembro de lia edzino de 38 jaroj, Pat (Patricia M. Charters), kiu kunhelpis en la instruado de pluraj Usonaj seminarioj por instruistoj de Esperanto.

Samtempe ni gratulas Duncan pro lia liberiĝo de ĉiuj ekstraj ŝarĝoj ĉe Principia Kolegio en aprilo 2009, kaj la sekvo ke li ek de tiam havos normalan instruhoraron tie, kaj esperas iri al Bjalistoko por la LK kaj al Krakovo por la konferenco de ILEI.

Dum la pasinta jaro nia prezidanto **Ron Glossop** (Jennings MO) donis prezentaĵojn loke kaj fore pri kiel aboli militon, pri kiel esti mondcivitanoj, kaj pri Esperanto. Li estas aktiva en multaj organizaĵoj, inkluzive "Citizens for Global Solutions", Usona Asocio por la Unuiĝintaj Nacioj, Alianco por la Internacia Krimtribunalo, kaj la Unua Unitariana Preĝejo de Alton, Illinois, kaj krome, la Esperanto-projekto "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" (<http://www.icxlm.org>).

En la novembro-2008 eldono de *Esperanto*, la lernolibro de **Boris Kolker** (Cleveland Heights OH) *Vojaĝo en Esperanto-lando* estis inter la "furoraĵoj" de la Libroservo en Roterdamo. (Vidu recenzo pri tiu libro sur paĝo 5.)

Lastatempe Unitarianoj kiuj estas Esperantistoj ekorganizas, dank' al la iniciato de **Neal Blonstein** <neil_nachum@yahoo.com>. La jenaj AAIE-membroj estas Unitarianoj: **Alan Boschen**, **Ron Glossop**, **Doroteo Holland**, **Sally Lawton**, **Mar Cardenas**, **Rick Miller**, kaj **Sherry Wells**.

Ni dankas al nova AAIE-membro **Miguel Ngel Gonzalez Alfonso** (Habana, Kubo), kiu ofertis esti nia Eduka Sekretariio. Tamen, aranĝi tion ne eblis pro la problemo de Usonaj korespondado kun Kubanoj.

Bela foto de la geedziĝa ceremonio de **Elizabeto kaj Filipo Dorcas** (Fort Worth TX) la 14-a de junio aperis en Usona Esperantisto 2008/5.

Oni elektis **Lusi Harmon** (Oakland CA) unu el la tri komisiitoj de la Elekta Komisiono por la kandidatoj por la UEA-estraro por 2010. Ŝi ankaŭ estas UEA komitatano A por Usono. Gratulojn!

En *Usona Esperantisto* 2008/5 aperis artikolo "Koro Vidas Pli bone ol Okuloj" de **Joel Brozovsky** (Spokane WA). Temas pri liaj spertoj gvidi blindulon dum internacia blindula kongreso de Esperanto en Kroatujo.

# Per-koresponda kursaro de E-USA

- Are you one of those rare people who don't have access to a computer, and/or aren't comfortable surfing the net?
- Would you like an opportunity to learn and/or improve your Esperanto at your own pace, with a private tutor?

If you answer "Yes" to these questions, we invite you to enroll in one of E-USA's correspondence courses. They are available in four levels (you decide which one is best for you), and there is no time limit:

Levels One and Two emphasize the development of everyday conversational skills.

LEVEL ONE • Using the textbook and CDs for the popular *Jen Nia Mondo 1* course, this twelve-lesson course will guide you to mastery of basic Esperanto.
COURSE MATERIALS: Workbook (32 pages), *Jen Nia Mondo 1* book (66 pages), and 3 *Jen Nia Mondo 1* CDs.
Course fee: $63
If you already have the book, deduct $14.80. If you have the 3 CDs, deduct $24.60.

LEVEL TWO • This thirteen-lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in its own right, and is recommended for the serious student as a follow-up to Level One.
COURSE MATERIALS: Workbook (53 pages), *Jen Nia Mondo 2* book (89 pages), 3 *Jen Nia Mondo 2* CDs.
Course fee: $63
If you already have the book, deduct $11.30. If you have the 3 CDs, deduct $24.80

LEVELS THREE AND FOUR, both conducted primarily in Esperanto, using Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, which is not only an advanced textbook but also a guide to the Esperanto movement and culture. Each chapter contains several short readings from Esperanto literature, footnotes, illustrations, and questions. Students who wish to improve their speaking and listening skills are encouraged to ask their instructor to suggest ways to practice these skills.
Course fee: $73.75 each   If you already have the book, deduct $31.75.

To register for any of these courses, send your name, mailing address, phone number, and email address (if any), together with an indication of which course you're interested in and whether you already have the textbooks or CDs in question, to Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530. Include a check for the course fee or your credit card number and expiration date. Phone the Esperanto-USA central office at (510) 653-0998 for more information, or email <info@esperanto-usa.org>.

# Recommended reading and listening

(Ĉiuj mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA kaj kelkaj ĉe la Libroservo de E-USA)

- **Bona Espero. Idealo kaj realo**. Roman Dobrzynski. 256p. Ilustrita historio de la bonfara esperantista institucio Bona Espero, verkita baze de interparoloj kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia.
- **"Elementary..!"** Esperanto Course. Angela Tellier, Vilĉjo Walker. T. Page. P. Gubbins. E. Grimley-Evans, D. Tellier. 224 + 127p. Du volumoj kaj du KD-oj. Plene ilustrita. Profesia E-kurso por anglalingvanoj, bazita sur *Gerda malaperis!*
- **Metodiko de la Esperanto-instruado**. Gvidilo por instruantoj de la Lingvo Internacia. Rudolf Raduŝa. Baza pedagogia gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo Esperanto. 189p.
- **Manlibro pri instruado de Esperanto**. Redaktis Katalin Kovats. Materialoj kolektitaj kadre de projekto por plivastigi kaj subteni instruadon de E inter junuloj. 150p.
- **Homaj Rajtoj: Demandoj kaj Respondoj**. Leah Levin. Ilustrita. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. 140p.
- **Donacoj por infanoj**. Ludmila Jevsejeva. Kvar libretoj po 16p. kun originalaj poeziaĵoj.
- **Lingvo Internacia** ("Unua Libro"). D-ro Esperanto. El la rusa tradukis A. Kerbel. 37p
- **Lingvo Internacia** ("Unua Libro"). Komputlia KD en formato PDF por PC kaj Mac. D-ro Esperanto. El la rusa tradukis A. Kerbel.
- **Fabeloj de Andersen**. 8 KD-oj. Voĉlegas Stano Marĉek. En Esperanton trad. L. L. Zamenhof. Pli ol sep horoj da popularaj rakontoj.
- **Fabeloj de fratoj Grimm**. 8 KD-oj. Voĉlegas Stano Marĉek. En Esperanton trad. Kabe. Preskaŭ 8 horoj da popularaj rakontoj.
- **Springboard to Languages**. Komputila KD. Kiel funkcias la fama brita projekto en baza lernejo en Lancashire?
- **Springboard to Languages--Games**. Barlaston. Komputila KD. Facilaj komputilaj lingvaj ludoj por infanoj lernantaj Esperanton. Uz-instrukcioj en la angla.
- **Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto**. Geoffrey Sutton. Antaŭparolo de Humphrey Tonkin. 728p. Ne nur literatura historio sed pli ĝenerala prezento de nia literatura kulturo, inkluzive de nia kritikarto.
- **Kantoj por ĝojo**. Kompilis Stanislava Dobrichovice. 63p. Trideko da popularaj kantoj, kun tekstoj kaj muziknotoj.

- **Tuj apude**. Gvidlibro tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. Humphrey Tonkin. 56p.
- **Vojaĝo en Esperanto-Lando**. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Boris Kolker. An ideal text for those who have studied Esperanto but feel a need to polish their grammar skills and to connect with the Esperanto world and culture. Each of the 26 lessons begins in an imaginary Esperanto club, to be visited by some famous Esperantist, and each contains:
    - A brief note to the reader summarizing what's in store for that meeting;
    - One or two pages of excerpts from famous Esperanto literature, each illustrated with fotos and drawings;
    - A preview of the next lesson;
    - Detailed footnotes ("KOMENTARO") giving explanations and background for each of the famous quotations;
    - LINGVA PRAKTIKO!
    - Specific tasks for the student to do, such as rewriting a passage in the first person; explaining specific expressions used in the text; finding passages that show certain characteristics; grammatical exercises based on the readings; quiz on the lesson's content; and vocabulary games (e.g., "Elpensu vortkunojn aŭ frazojn kun jenaj paronimoj: Rajdi-rajti, kruda-kruta, fronto-frunto, diveni-deveni, tempo-tempio.)

Since there are no "keys" for the exercises, and since the entire textbook is in Esperanto, anyone using this textbook should ideally have an experienced Esperantist who can answer questions and correct errors. Such a set-up is available to those who enroll in Levels 3 or 4 of the E-USA (see page 4).

*Special request*: If you have used this textbook, we invite you to send the editor comments about your experience.

## Kalendaro

**Majo 2009**

*1-10:* **21-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto"** en Ukraino (<volodomir@ukr.net; <www..ulej.org.ua/aj>)

*22-25:* **57-a Jarkunveno de Esperanto-USA** - St. Louis MO. Speciala gasto: Kuba gitaristo Julian Hernandez Augulo. Kongresejo: Sheraton Westport Lakeside Chalet Hotel. (Ron Glossop <rglossop@mindspring.com> aŭ <http://esperanto-usa.org/node/1247>)

*24:* **Jarkunsido de AAIE** - Tagmeze - kadre de la jarkunveno de Esperanto- USA (vidu supre)

**Junio 2009**

*25-28:* **Alternative Education Resource Organization (AERO) Conference** - Russell Sage College, Troy, NY (<www.aeroconference.com/>)

*29-17 jul:* **NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro)** NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) - Universitato de Kalifornio en San Diego CA; 3 weeks, 3 levels, 5 college credits. (Ellen Eddy <eddyellen@aol.com> or <http://Esperanto.org/nask/>)

**Julio 2009**

*17-25:* **42-a ILEI-Konferenco** - Krakovo, Pollando (Aida Ciziktie, <aiduze@gmail.com>

*25-01 aŭg:* **94-a Universala Kongreso** - Bjalistoko, Pollando; pro la 150-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof en tiu urbo (http://uea.org/kongresoj/uk_2009.html; <info@uea.org>

*25-01 aŭg:* **40-a Infana Kongreseto** en junul-gastejo "Bukovisko" de la Eduka Centro de Suprasi, urbeto16 km de Bjalistoko. (Bert Schumann ĉe <bert.schumann@free.fr> kaj/aŭ <http://bertosch.free.fr/ik2009/index.html>

**Julio 2009**

*20-22 nov:* **American Council on the Teaching of Foreign Languages (ACTFL) Annual Convention and World Languages Expo** - San Diego CA. For more details and for state meetings, state meetings, see <www.actfl.org>

**2010**

**95-a Universala Kongreso** - En Havana, Kubo

**2011**

**Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE8)** en Brazilio

*NOTO: Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe: www.eventoj.hu/kalendar*

## Esperanto-instruado alilande

In **Africa** Esperanto is being taught through correspondence courses (about 100 people are currently enrolled) and in the following places: Benin: 48 students in the elementary school "Jules Verstraeten" in Kodj have just completed a beginning course and intend to continue studying Esperanto in a high school in Adohoun. There are also Esperanto classes in Togo (Lome).

Last September some 20 people from 8 countries attended an Esperanto study program in Banjaluko, **Bosnia-Hercegovino**. It consisted of four 8-lesson courses and was sponsored by the International Academy of Sciences in San Marino.

Approximately 120 elementary-school students in Taiyuan (Shanxi province), **China** are studying Esperanto.

This year, in the elementary school “Komlostetoi” in Miskolc, **Hungary**, where Esperanto has been taught for over 20 years, more than 30 children are studying Esperanto. They are part of the Comenius project “Cooperation between schools” and plan to visit Esperanto classes in England and Germany which they are in regular contact with.

Last summer a total of fifty-nine Vietnamese (ages 11 to 80) attended a series of 26 Esperanto lessons taught in 4 different locations in **Vietnam** by an Esperanto professor from the Pedagogical University in Bydgoszcz, **Poland**.

For the 9th consecutive year the People’s Institute of Valamo, **Finland**, and the Esperanto Association of Finland organized a 3-level Esperanto course, this year attended by 23 students and taught by 3 Esperantists, each from a different country (**Sweden**, **Estonia**, and **Russia**.

Following two years of contact between a school in Bar Hill/ Cambridge, **England**, and one in Herzberg, **Germany**, 9 children, 8 parents, and 3 instructors recently gathered for a 5-day visit in Herzberg.

Esperanto students from twin cities Herzberg, **Germany**, and Gora, **Poland**, met last August for a two-week get-together at a summer camp.

# Teaching suggestions

Ĉu vi rimarkis la artikolon de nia vic-prezidanto D. Gary Grady en *Usona Esperantisto* 2008/5 “Making things harder than they really are”? En ĝi li sugestis novan aliron al kiel pripensi pri la problemo “transitiva/netransitiva”. Ĉu tio sugestas al vi alian manieron klarigi transitivecon al lernantoj de E-o?

Jen interesa instrumetodo kiun uzis nia forpasinta membro Don Houpe en sia “intermediate” klaso de 16-18-jaruloj ĉe la “North Carolina School of Science and Mathematics” en Durham, NC:

“Each student selected a book in Esperanto from the Library and wrote a one-page report in Esperanto. Each student presented his/her report orally to the class, writing new vocabulary on the board. At the end of a report the presenter asked 4-5 questions in Esperanto of the class. Members of the class were also encouraged to ask questions in Esperanto of the presenter.”

Jen sugestoj pri instrumetodoj uzeblaj en klaso kies lernantoj kune legas ian romanon:

a) Interkonsentu pri kiujn paĝojn oni legu kiel hejmtasko por la estonta klaso.
b) Dum la klaso
    - Unue faru kelkajn specifajn demandojn pri kio okazis en la legita teksto;
    - Poste, traktu aparte ĉiun paĝon, inkluzivante tiajn demandojn kiaj la jenaj:
        - Ĉu vi havas demandojn pri la enhavo de tiu paĝo? [Se temas pri vort-signifo, paŭzu por konsulti vortaro(j)n].
        - Ĉu vi rirmarkis aparte trafajn esprimojn, priskribojn, vortojn?
        - Kial oni uzis la finanĵon “e”? (aŭ simila demando pri gramatiko)
    - Laŭtlegu laŭvice
        - Konversaciojn;
        - Parton de la hejmtasko kiun iu klasano ankoraŭ ne legis hejme

# Announcements

Korekto: La ĝusta ret-adreso por la ret-paĝo de Enriko Ellemberg estas http://www.esperantofre.com/eeo/lern.htm

Kun la gvido de s-ro WEI Shan funkcias E-kurso en Baiyangshu-strata elementa lernejo en la urbo Taiyuan (Shanxi-provinco). Temas pri la unua elementa lernejo, kiu havas oficialan E-kurson. Ĉirkaŭ 120 lernantoj (1-3-klasaj) lernas E-on. La kursanoj volas ekhavi rilatojn kun aliaj lernejoj. Por ricevi kontaktadresojn skribu al LEE Jung-kee <esperanto@saluton.net>

**Serĉata estas instruisto**:
*Dunganto*: Swany Korporacio (Etsuo Miyoŝi).
*Laboro*: Instrui kaj konsili pri la angla kaj Esperanto.
*Salajro*: 250,000 (nete 228,000) jenoj monate.
*Vojaĝo*: Ambaŭflanken ni pagos ĉion.
*Labortempo*: 7:30-12:00; 18:00-20:00.
*Ferioj*: 125 tagoj jare.
*Periodo*: De marto 2009, kelkajn jarojn.
*E-kurso*: En la feria tago, 1-an kaj 3-an sabatojn (13:30-15:00)
*Loĝejo*: 56 kvadrataj metroj, kompania apartamento. Vi pagos monate 50 000 jenojn, elektron, gason ktp.
Sendu biografion al <e.miyoshi@swany.co.jp>

La supra anonco troviĝas sur paĝo 234 de la novembro/ 2008 eldono de *Esperanto*. Supozeble temas pri japanio.

**Ne forgesu:**
Pagi vian kotizon por 2009 (uzu paĝon 8);
Sendi informojn pri via Esperanto-klaso (uzu paĝon 7)

La limdato por ricevi kontribuojn al la aprila *Bulteno* estas la 15-a de aprilo, 2009. Aparte bonvenaj estas viaj sugestoj pri efikaj instru-teknikoj. Sendu ilin al la redaktorino Doroteo Holland e-poŝte <dorothyjeanh@gmail.com> aŭ per ordinara poŝto (5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521 Usono).

# American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR
Name Address ________________________________________________
Email address ________________________________________________

COURSE
Location ________________________________________________
Tuition cost ____________________________________________
Level: Elementary_____ Intermediate______ Other____________
Beginning and ending dates_____________________________
Number of lessons _______ Duration of each lesson ____________
Material used: Books_______________________________________________________________
Videos____________________________________________________________________
Other_____________________________________________________________________

STUDENTS
Number finishing course ________ Age range_____________
Previous language skills ____________________________________________________________
Is the course shown in the student records? ___________
Was an AATE exam administered? ___________

FORMATION OF CLASS
Name of organizer________________________________________________________________
Publicity method used_____________________________________________________________
Supplier of course materials_________________________________________________________

COMMENTS OF INSTRUCTOR
Concerning publicity

_____________________________________________________________________________
_____________________________________________________________________________

Concerning materials

_____________________________________________________________________________
_____________________________________________________________________________

Concerning teaching

_____________________________________________________________________________
_____________________________________________________________________________

*Please return this form to:*

Sherry Wells
P.O. Box 1338
Royal Oaks, MI 48068

E-mail: <esperantosherry@tm.net>

# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME_____________________________________ PHONE (___)______________

ADDRESS____________________________________________________________

CITY. STATE________________________________________ ZIP ______________

E-MAIL ADDRESS_________________________________

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___My e-mail address ___Other ______________

NAME & ADDRESS OF SCHOOL __________________________________________

__________________________________________

Are you a professional educator? ___Yes, active ___Yes, retired ____No

Annual dues are $40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are $20. Please indicate here: _______

Life Membership $800 _______ with subscriptions by mail $400 _______ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20___ ___New ___Renewal Today's date:__________

I wish to give $________ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027

### Please answer the following questions even if you are already a member for 2009!

Do you think AATE/AAIE should change its name? ____ Yes ____ No
If yes, which of the following would you prefer?

____ Esperanto-Instruistoj en Usono kaj Kanado (IE-UK)

____ Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Usono kaj Kanado (ILEI-UK)

____ Other _________________________

If you are a life member or have already renewed for 2009, please send the answers to the president, Ron Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings MO 63136-5004; or <rglossop@mindspringcom>), or to the editor, Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521; or <dorothyjeanh@gmail.com>.